N I A F O L I E T O - MONATA BULTENO
- - - - - - - - - - - - de la Genta Esperan-
tista Grupo " L A P R O G R E S O " .
Dua Jaro = Septembro 1919 = Numero unua .

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

JARA ABONPREZO : Enlande : 1'25 Fr. = 0.0.50 SM.
Fremdlande : 7 respond-kuponoj .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

REDAKTEJO : Koophandelsplaats 11 GENT BELGIO
Place du Commerce 11 Gand BELGIO

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

## KARAJ GELEGANTOJ .

" NIA FOLIETO " komencas sian duan vivjaron . Fondiĝinta la duan de Junio 1918, pro la terura militista okupado ĝi ne povis ŝin montri publike, kaj do ĝi aperis nur unuekzemplere kaj manskribite , Ĝi tiel daùriĝis ĝis sia 7-a numero . (Plena kolekto legebla en la biblioteko de "La Progreso")

La cirkonstancoj pliboniĝis por ĉiuj , escepte por "Nia Folieto", kiu de la komenco de 1919 ne plu aperis . Ni ankaù opiniis ke post iom da tempo la novado , reviviĝante tra tuta Belgio, renaskiĝus Belgan Ĵurnalon ; sed ŝajnas ke ni eraris.

Ni do per malgranda ofero , penos daùrigi la aperadon de Nia Folieto , ĝis kiam ĝi ŝajnos troa .

Pro la ŝanĝo de la cirkonstancoj estus malsaĝe daùrigi kielĉe la fondiĝo : per manskribita unuekzemplera ĵurnalo .

" NIA FOLIETO", de hodiaù, eniras la tutan mondon . Ni esperas ke nia provo estos bone sukcesanta , kaj ni penos kiel eble plej kontentigi nian legantaron per sciindaj informoj ĉiulandaj . Pro tio ni petas niajn fremdajn legintojn sendi al ni ĉu resumajn raportojn pri la nacia movado , ĉu plenajn informojn kiujn ni mem resumos laù spaco uzebla .

Ni volonte interŝanĝos la ĵurnalon kun fremdaj bultenoj.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

NI PROMESIS : Artikolon pri geografiaj nomoj en Esperanto,
= = = = = = = literaturaĵojn , felietonon , stenografian aldonon , sciencan artikolon , k.a. .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

V I K I U R I C E V A S N I A F O L I E T O 'n

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

## ĜENERALA KUNVENO.

Dimanĉon la 14-an de Septembro okazis en la sidejo la jara ĝenerala kunveno. Sur la tagordo troviĝis:

1e- Raportoj de la prezidanto, kasistino kaj bibliotekisto;
2e- Ŝanĝo al la regularo.
3e- Elekto de la komitato por la jaro 1919-1920.

Ĉi tiuj punktoj laŭvice prezentitaj, la komitato estas kunmetita jene:

Prezidanto: S-o L. Cogen. - Vicprezidanto: S-o A. De Maertelaere. - Sekretariino: F-ino I. De Vliegher. - Kasistino: F-ino E. Colyn. - Bibliotekisto: S-o O. Van Hove. Helpkomitatanoj: S-oj: V. Hendrickx, M. Semerling, kaj A. Van Haute.

Povu ĉi tiu areto, per ĉeca laboro kaj laŭdinda iniciativo ankoraŭ plifirmigi la bonfamon de nia kara Progreso.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

## NOVA SONO.

Afriko, Ameriko,
Azio, amiko,
Eŭropo, insuloj
de la sovaĝuloj,
Multnombra landaro
Kaj oceanaro,
Estas nur unu terglobo,
Ĝi estas nia.

Kaj samideanojn
Malsamalingvanojn
Ekkonas jam frato
la nunkomprenato
malamikigita per f
pro forto milita.
Estas nur unu helplingvo
Ĝi estas nia.

M. Semerling.

Kiel aldono al ĉi tiu numero ni donas muzikon originale verkitan je tiu kanto.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

## B E L G A  M O V A D O.

### AVIZO.

Ĉiu Belga Esperanta Societo rajtas disponi pri 2 linioj almenaŭ, sub "Belga Movado"-rubriko, kondiĉe ke minimume 5 abonoj estu prenataj je ĝia nomo aŭ je tiuj de iuj el ĝiaj anoj. Belgaj Grupoj, profitu de tiu propono por diskonigi vian Titolon, Sidejon, Estraron.

- - - - - - - - - - - - - -


Per ĉi tiu ni sincere dankas ĉiujn Belgajn Societojn kaj diversajn Esperantistojn kiuj afable respondis al nia inform-peti-karto de la 2-an de Majo pri la stato de Esperanto en Belgio. Ni instigas ilin aboni nian modestan Folie-

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

E C U  Ĝ I N .

# Nova Sono

Teksto: M. Somerling    Muziko: V. Hendrickx.




Esperantista Tajpo.

IA STENOGRAFIA FOLIETO : ...........
a stenografia parto (Sistemo GROOTE) ne jam nun povas esti
renidonata .

---

on, kiu informos ilin kiel eble plej pri la movado . Laŭ
povo ni publikigos la rezultaton de nia informado en venonta numero . ..................................

JARA KONKURSO ? Kuraĝigita de antaŭ unuaj literaturaj Konkursoj kiujn ĝi organizis, la Komitato decidis renovigi tiun ĉi jaron la provon, sed je pli ampleksa karaktero : internacie anstataŭ ol inter la lokaj Gentaj Esperantistoj . Ĉiuj Belgoj kaj alilandanoj kiuj interesiĝas je ĝi, petu k.s.p. frue la klarigan reguleron al la redaktejo.

PROPAGAND= SEKCIO : En la mezo de nia grupo fondiĝis propagand-sekcio, kiu deziras interrilati kun alilokaj, ali landaj samcelaj organismoj por alcentrigi internacie propagandajn dokumentojn . Per kunigitaj laboro oni atingos pli facile la celon . - CIULANDAJ SOCIETOJ estas petataj sin turnigi al la propagandcentro Hendrickx V. en la sidejo .

KURSOJ : Kursoj estos organizataj ĉiutage, komence de la 13-a de Oktobro ; lundon de la 6-a ĝis la 7-a ĉiutage de la 8-a ĝis la 9-a vespere . Pli specialaj kursoj por fraŭlinoj (unuagrada) kaj perfektiga kurso estos organizataj . La separtoprenontoj bonvolu enskribigi sin ĵaŭdon la 16-en de Oktobro je la 7-a vespere en la sidejo .

?ISAJ GENTAJ ESPERANTISTOJ : Abonu "Nia Folieto"n , je la ?ekinda prezo de 1,25 Fr.; ĝi regule havigos al vi Tutmondajn informojn . Varbu inter viaj gekonatuloj ?ernantojn por la kurso kaj abonantojn por "NIA FOLIETO" .
Koran antaŭdankon .

FREMDAJ GELEGANTOJ : Helpu nin . Abonu je tiu malgranda kosto la nuran nunan Belgan Bultenon Esperantistan .

NIA ESPERANTA EKSPOZICIO : La organizintoj dankas tutkore la kunhelpintojn kiuj sendis al ni elmetaĵojn por la propaganda ekspozicio je la profito de la militvunditoj .

FOTOGRAFAĴOJ de la Ekspozicio (4 diversaj) estas ankoraŭ aveblaj je 0,30 fr. po unu, aŭ 1,20 fr. la tutan serion.
( 1,00fr. = 0,40 Sm. ; 1,000 Sm. = 2,50 fr. )

...............................................................

LEGIGU ĜIN ABONU ĜIN .

LA GEKORESPONDANTOJ DE NIA MEMBRARO [illegible] trovos ĉiam senkostan [illegible] ĉe S-o VERHEYT, ferajo-kaj ladvendisto , Place de l'[illegible] - 15 - [illegible]plaats
Bonvolu informi antaŭe kaj skribi .

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

AVIZO AL LA KOMERCISTOJ ESPERANTISTOJ :
Por propaganda celo , bonvolu konigi viajn fabrikaĵojn , sendante al ni duobl-ekzemplere viajn kondiĉojn , k.t.p. , sur via firmpapero .

Tutkoran dankon al la komercistoj kiuj respondis al nia anonco en ESPERANTO . Ni petas ke tiuj kiuj povas , havigu al ni diversajn informojn pri la adresoj sendotaj : traktajoj , prezoj , kondiĉoj , reklamiloj , broŝuroj , k.t.p.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

KONATIĜO KUN FREMDAJ SAMIDEANOJ : Lasttempe la Progresanoj havis la plezuron konatiĝi kun fremdaj (Francaj kaj Angla) samideanoj .

Kiu ajn Esperantisto vizitanta Genton , ne preterlasu ĉeesti la kluban kunvenon okazantan ĉiulunde je la 7 1/2-a vespere en la sidejo : Kafeo "La Borso" -
Koophandelsplaats - 11 - Place du Commerce
KORAN AKCEPTON ILIN ATENDAS .

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Ni plej sincere rekomendas al nia leganaro abonon al :
FRANCE-ESPERANTO . Multenhava bulteno . 5 fr. po 12 numeroj .
Rue de Clichy 51-Paris-IX.
FRANCIO.

MIGRANTAJ KARTOJ ESTAS ri-ceveblaj de C.C. GOLDSMITH, 92, Douglas Road, Acocks Green - Birmingham - 12 por 4 resp.kup.) ANGLIO
U.E.A. Delegito .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

E S P E R A N T I S T A   F A J F O .
= = = = = = = = = = = = = = = = = =

Dum ekskurso , dum vojaĝo , kiam vi forgesis surmeti la VERDAN STELON , uzu la ESPERANTISTAN FAJFSIGNALON por konatiĝi kun samideanoj ĉe stacidomoj , publikaj kunvenejoj , k.t.p. . ( vidu aldonon ).
-------------- sed ..... plej bone .....

PORTU ĈIAM LA V E R D A N   S T E L O N .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

A B O N I G U   Ŝ I N .

. . . . . . . . .